Kongresa numero 5.

„Mutig vorwärts!“ **Aŭstria** „Kuraĝe antaŭen!“

Esperantisto

(Österreichischer Esperantist)

Oficiala organo de Int. Esperanto-Muzeo kaj Aŭstria Esperanto-Asocio

Abonprezo (komencebla ĉiumonate) por Aŭstrio ŝ 4.60, [k]omencebla ankaŭ en partpagoj (½ j. ŝ 2.35), aliaj landoj sv. fr. 3.75; ponumere 45 g (1 resp. kup.).

Aperas la 5. de ĉiu monato. **Leteradreso:** Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803). Manuskriptojn ni nur resendas kun reafranko. Poŝtŝparkaso-konto D-123.826.

Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro.

[N]ro 5 (130 en la vico) | Korneuburg ĉe Wien, la 5. de majo 1936. | 13. jaro

Turismo kaj Esperanto.

De Anton Schöpfer,
ĝeneral-direktoro de Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj.

De jaro al jaro kreskas la nombro de [f]remduloj, kiuj estas kondukataj de la [A]ŭstriaj Federaciaj Fervojoj al ĉiuj [r]egionoj de nia lando. La fakto, por ni [A]ŭstrianoj tiom ĝojiga, ke nia hejmlando [e]stas en la tuta mondo tiel multe ŝatata, [d]evas kompreneble sian ĉefan kaŭzon en [l]a lando mem, en nia Aŭstrio, tiel mal[g]randa je area spaco, sed tiel riĉa je [m]ontoj de pejzaĝo kaj trezoroj de nobla [m]alnova kulturo.

Oni povas atribui al bone organizita [v]arbo-servo eĉ la plej grandan valoron, [k]vamen ĝi povos neniam anstataŭi tiun pro[p]agandon, kiun efikas la kontenta ekster[l]anda gasto mem per plurakontado de siaj [a]grablaj rememoroj al siaj samlandanoj.

Al tiuj, kiel la sukceso montras, ĝojigaj [i]mpresoj, kiujn la eksterlandano ricevas en [A]ŭstrio, apartenas ankaŭ la konvinko [e]ngravurigĝanta al ĉiu fremdulo, ke li estas [a]kceptata kiel gasto efektive kaj reale de [l]a loĝantoj de nia lando kaj ne nur en [p]ropagandaj broŝuroj.

Al la karaktero de nia popolo respondas, [k]onkonti ĉiun, kun kiu ni ekrilatas, kun [s]impatio kaj afableco.

Pro la jus nomitaj kaŭzoj ne estas sekve [m]alfacila tasko por la direkcio de Aŭstriaj [F]ederaciaj Fervojoj, eduki sian oficistaron [p]or la rilatado kun fremdaj vojaĝantoj. Tiu [s]i edukado estas de mi konsiderata kiel [u]nu el la plej gravaj aranĝoj, servantaj [a]l la vigligo kaj akcelo de fremdul-trafiko. [S]ame kiel ni penas konstante zorgi per [t]eknikaj plibonigoj por la komforto de l'vojaĝanto kaj per tarifaj disponoj por faciligo de vojaĝado entute, same grave estas ankaŭ, zorgeme prepari tiun ofi-cistaron, kiu havas kontakton kun la

fremduloj, por la servo je la internacia publiko.

Ni respondas per tio, kiel mi kun granda kontenteco ĉiam denove povos konstati, nur al la propraj deziroj de niaj ofic-havantoj, por kiuj estas ĝuste afero de fiereco, povi esti komplezaj al eksterlandaj vojaĝantoj.

Unu el la unuaj premisoj por tio estas la kono de lingvoj. La Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj havas per instalo de multaj lingvaj kursoj, kies frekventado precipe al la konduktoroj estas senkoste ebligata, jam nuntempe signifan nombron da lingvosperta servo-personaro.

Kvankam la edukado de lingvospertaj konduktoroj estas komencita nur antaŭ tri jaroj, tamen jam hodiaŭ pruvis pli ol triono de la konduktoroj, designitaj por tiu ĉi servo, per farita ekzameno, ke ili akiris konon de fremda lingvo, sufiĉan por uzado dum la dejoroj.

Ne malpli ol 124 konduktoroj faris kun sukceso la ekzamenon pri Esperanto. Per tio, ke la Aŭstriaj Federaciaj Fervojoj konsideras la Esperante parolantan konduktoron kiel lingvo-konanton, ili agnoskis la signifon de l'Esperanta movado en plena mezuro kaj el sia vidpunkto certe kontribuis al tio, ke la intereso por ĝi en la rondoj de l'fervoja personaro, sed ankaŭ inter la vojaĝantoj estu vigligata kaj daŭre subtenata.

Ni havas la motivitan esperon, ke dum malmultaj jaroj ĉiuj, en la ekspresaj kaj personaj trajnoj dejorantaj konduktoroj estos kapablaj paroli fremdan lingvon.

La Esperante parolantaj konduktoroj, kiel mi rajtas konkludi laŭ la ĝisnunaj spertoj, same per sia nombro kiel ankaŭ per sia servopreteco, portata de pura entuziasmo por ideala afero, faros ĉe la vojaĝantaj fremduloj valoran varbo-servon same por nia lando kiel ankaŭ por la mond-ampleksanta Esperanto-movado.

Paska kunsido de la estraro de UEA, en Genève.

aprilo 1936.

Oni sulĉe legis en diversaj gazetoj kaj aŭdis de diversaj flankoj, ke oni intencas detrui nian Universalan Esperanto-Asocion, ke la komitato deziras dispecigi la centron en 4 partojn, kiuj estu en Paris, London, Stockholm kaj Wien.

Ofte jam ni aŭdis helpkriojn pro simila kaŭzo, tiel estis 1928 en Antwerpen, 1931 en Paris, 1933 en Köln, 1934 en Stockholm.

Kaj ĉiam la esperantistoj-helpkriantaj estis malpravaj: Neniu deziris detrui UEA, ĉiu deziris helpi UEA, ne ludante „struto-politikon", sed rigardante la staton de la movado, kia ĝi vere estas. En Stockholm ni vidis, ke UEA estas „vid-al-vide de nenio", ni ricevis de la direktoro de UEA budĝeton, kiu antaŭvidis deficiton de sv. fr. 25.000, kvankam la tiama kapitalo de UEA (donaco de Hodler, proksimume 180.000 sv. fr.) estis for.

La novelektita estraro kun la Komitato plenkonscie pri la danĝera situacio de UEA kaj pri la grava, respondeca kaj sendanka ofico, kiun ili transprenis, kiel ĥirurgo rigardis la aferon kaj operacie fortranĉis la malsanan parton.

Direktoro Kreuz transprenis la malfacilan taskon, reorganizi la oficejon, plisimpligi la laboron kaj ŝpari, ŝpari kaj ŝpari. Pro tio ankaŭ nur aperis komplemento al la jarlibro.

Sed ni sukcesis ekvilibri la budĝeton kaj anstataŭ la antaŭvidita granda deficito la unuan fojon depost multaj jaroj nia bilanco por 1935 finiĝis sen deficito.

Nia direktoro Kreuz, tro strečinte siajn fortojn, subite mortis la 1. de februaro.

Nova granda problemo! Kiu transprenos lian gravan kaj grandan laboron?

Ĉu la jam depost multaj jaroj intencata translokiĝo de UEA (mi priparolis la unuan fojon ĉi tiun demandon kun direktoro Hans Jakob 1927 dum la konferenco „Paco per lernejo" en Praha) nun estu efektivigata?

Kaj jen la prezidanto de UEA generalo Bastien faris enketon kaj petis de la decidorajta Komitato de UEA (konsistanta el elektitoj de la diversaj Landaj Asocioj, reprezentataj en UEA) respondon pri jenaj demandoj:

1. Ĉu vi akceptas la principon de larĝa malcentralizado de la propagandaj taskoj, respektante la statutojn, la plenan rajton de la Komitato kaj la superan direkton de la Estraro? Respondoj: Jes 20 voĉoj, ne 1 voĉo.

2 a) Ĉu vi nepre volas, ke Centra Oficejo restu en Svisujo? Resp.: Jes 4, ne 17.

a b) Ĉu vi nepre rifuzas translokigon en Londonon (kun s-ro Goldsmith kiel direktoro)? Jes 5, ne 16.

2 c) Ĉu vi nepre rifuzas translokigon, en Vienon (kun direktoro poste elektota)? Jes 11, ne 9, sindeteno 1.

2 d) Se vi ne rifuzas Londonon nek Vienon, montru ĉi-sube kiun el tiuj du urboj vi preferas.

Resp.: Ne volas translokigi	4
Volas aŭ preferas Londonon	11
Volas aŭ preferas Vienon	6

Kvankam mi mem estis proninta Vienon kiel sidejon de UEA, mi tamen devis konsenti, ke jam el propaganda vidpunkto la elekto de London estas la pli bona, kaj kial?

1. ĉar nia Centro nun estos en la metropolo de la Brita Imperio kaj forfalos la eldiroj de la kontraŭuloj de Esperanto, ke la angloj neniam deziras ion scii pri E., 2. ĉar la ekzistebleco tie estas pli garantiata ol en Genève, ĉar en London ni ŝparos multan monon por lupago, oficistoj ktp. kaj 3. ĉar ni trovis laŭ mia opinio la plej taŭgan direktoron en la persono de s-ano C. C. Goldsmith, longjara sperta ĝeneralsekretario de Brita E-Asocio, bona komercisto kaj senpasia kalkulanto. Ke UEA ŝparos pojare en la salajro de la nova direktoro sufiĉan sumon, estas certe grava punkto. (Antaŭ la elekto de la unua estraro la elspezoj por la du direktoroj estis 18.000 sv. fr. pojare, nun nur sv. fr. 5400.—.

Vi vidas, ke ni ŝparas kaj devas ŝpari por uzi la elspezojn por niaj gravaj celoj!

Kaj ĉiu tago de plia restado en Genève kostas plian monon ol necese. Tial la estraro de UEA decidis laŭ la rezulto de la enketo inter la Komitatanoj, ke la Centra Oficejo translokiĝos la 1. de majo al Londono kaj de tiu ĉi tempo UEA funkcias en Londono, 142 High Holborn, London W. C. 1, sed la movado ne estos dispecigata, sed restos centralizata en Londono.



Lasta kunsido de Estraro de UEA en Genève.

De md. Goldsmith (London), Movo (Genève), meze prez. generalo Bastien (Paris), vicprez. inĝ. Isbrücker (Haag, kiu faris la foton), Malmgren (Stockholm), Steiner (Wien).

Kelkaj svisaj esperantistoj protestis al la Tribunalo en Genève antaŭ kelkaj tagoj kontraŭ tiu decido, citante artikolon de la statuto. La Svisa Asocio apogas ilin. Kompreneble tio ŝanĝas nenion je nia nova organizo.

Ni rajtas esperi, ke tiu translokigo markos novan epokon por UEA.

Novorganizo kaj propagando: La Estraro komisiis s-ron Malmgren por diversaj laboroj, speciale enketi ĉe la Landaj Asocioj pri ilia agado, ilia propagando, iliaj deziroj ktp.; interrilatiĝi kun la Landaj Asocioj koncernataj, por ke Esperanto estu reprezentata en la internaciaj konferencoj „Nova Eduko" (Britujo), „Junuloj" (Svisujo), „Gastejoj por junularo" (Danujo); pristudi eblecon de Unuiĝo de Fervojistaj Esperantistoj laŭ propono de s-ano Heidl en Linz (prezentita de Steiner), ktp.

La Estraro delegis s-ron Andre Baudet en Paris, prezidinto de Paris-a Ĉambro de Komerco, por reprezenti UEA en „Intern. Kongreso pri Teknika Instruado".

Financaferoj: La budĝeto por la nuna jaro, malgraŭ translokiĝigo de la Centro ktp., singarde pristudata, antaŭvidas ekvilibron. En la venontaj jaroj ni povos jam disponigi sumojn por niaj ĉefaj celoj de la propagando ktp.

Jarlibro de UEA: Dir. Goldsmith preparas ĝin kun helpo de s-ro Movo pri la listo de la delegitoj kaj ĝi aperos versajne junio kaj venontjare jam komence de la kura jaro. El la enhavo: a) informo pri la ofici organizo, la fakaj, la gazetaro kaj konsiloj la delegitoj, b) raportaro de la Landaj Asoc pri la laboro en la diversaj landoj dum la la 12 monatoj, c) laŭlanda informo kiel en jarlibro 1934, sed sen la grupoj kaj sen informo pri urboj, escepte de la loĝant (oni esperas tamen enmeti la informon pri grupoj en estontaj jaroj).

Gazeta problemo: Espereble la int diskuto de la afero inter la Estraro de U kaj s-ro Jung montros tre baldaŭ kontenti solvon.

28. Univ. Kong. de Esp.: S-ro Stei raportas pri la preparoj. — Oni decidas, ke prezidanto malfermos la unuan laborkunsido farante paroladon pri la ŝanĝo en la organiz En la dua laborkunsido s- Malmgren faros enkonduk paroladon pri la metodoj propagando. Oni elektos reĝim de la kongreso kaj starig konkurson de opinioj pri cer Esperanto-libroj.

29. Kongreso de E. 19 S-ro prof. Bujwid sendis sciig ke la preparaj laboroj bo marŝas. La Estraro komis s-ron Steiner, ke li interrilati kun LKK de 29-a, profitante si sperton de la 28-a kaj montra dezirojn de la Estraro.

30-a Kongreso 19 Envenis proponoj de Ce slovaka Respubliko kaj Ju slavujo. Plie Steiner transdo buŝe oficialan inviton de B garujo, aranĝi la kongreson e tiu lando. Nek oficialaj inv nek la necesaj sciigoj alvenis nun al C. O., kiu nun int rilatiĝos kun la 3 naciaj land La afero estos poste submet al la Estraro por definit decido.

Biblioteko: La Estra decidis, ke la biblioteko de U estos aparta fako de Na Biblioteko, konservata en Int nacia E.-Muzeo en Vieno je la sekva kondiĉoj:

a) la biblioteko estos parto de Nacia Bibl teko de Vieno, en apartaj ejoj.

b) la regularo estos tiu de Nacia Bibliote La eniro estas senpaga.

c) se pro iu kaŭzo Nacia Biblioteko ne po aŭ ne volos plu konservi nian Bibliotekon, estos redonita al UEA. (Ekzistas kontra inter Int. E.-Muzeo kaj la Ministerio Instruado pere de Nacia Biblioteko, ke N. konservos eterne Int. E.-Muzeon en sia kad Kaj N. B. jam ekzistas pli ol 250 jarojn!)

d) klasigo de tiu biblioteko okazos en Vi kaj la troaj ekzempleroj restos je dispono UEA.

S-ro Steiner estas komisiita por zorgi pri instalo kaj klasigo.

Sur ĉiuj ŝrankoj kun la biblioteko de U (ili estos disponigataj de la administrado Kortega Kastelo) estos ŝildeto kun la ti „Universala Esperanto-Asocio".

La Estraro sendis informojn pri ĉi tiu dec al jenaj personoj:

1. Federacia Prezidanto de Aŭstrio, Wilhelm Miklas, protektoro de Int. E.-Mu

2. Federacia Kanceliero de Aŭstrio, Kurt von Schuschnigg, Honora Membro IEMW,

3. Ministro por Komerco kaj Tra s-ro Fritz Stockinger, Honora Membro IEMW kaj granda amiko al E.

jus alvenis jena letero:

Kabineta direktoro
Federacia Prezidanto.

Wien, 23. aprilo 1936.

Tre estimata sinjoro Kortega Konsilisto!

La sinjoro Federacia Prezidanto ricevis la ribajon de la 12-a de aprilo nj., kiun la traro de Universala Esperanto-Asocio al li rektis, kaj komisiis min, komuniki al vi, ke sekve de sia granda intereso por la esperanj kun sincera ĝojo sciiĝis pri la decido UEA, enkorpigi la tutan bibliotekon al ternacia Esp.-Muzeo en Wien. Akceptu, tre timata sinjoro Kortega Konsilisto, la esprin de plej perfekta altestimo de via plej rfekta altestimo de via plej sindona.

D-ro Huber, Kabineta Direktoro.

*

La laboroj daŭris 2½ tagojn de matene ĝis 20 h kaj ili respegulis la egan deziron de Estraro, antaŭenpuŝi nian movadon sur ĉiuj npoj kun novaj fortoj kaj espereble kun nda rezulto.

Al fina venko per la helpo de ĉiuj niaj nideanoj! Steiner.

Al samideanoj ĉiulandaj.

De Karl Jimel, Wien *).

Jam bonvenigis vin pli frue
Aŭstrio el la tuta kor',
por ke vi restu senenue
en festa rond' dum kelka hor'!

Kaj ne perdiĝis ĝia voko!
Ja estas ne unua foj',
ke vi en mondkongresa loko
kunvenas kun plej granda ĝoj'.

Dun longa temp' movad' jam vivas,
plenumas sencon de la vort':
de l' verbo „movi" ĝi derivas
sin movi supren per la fort'.

Kongres' signifas apogejon,
de kiu marŝo de l'arme'
novdirektiĝas en nov-ejon,
fortiĝas freŝe la ide'.

Samtempe estas grand-revuo
pri prov' kaj nombro de l'anar',
formig' de plua evoluo,
pritrakto de kial' kaj ĉar'.

Al dudekoka mondkunveno
invitas nia lando nun,
al nova paŝ', al paca beno
sub de l'esper' feliĉa sun'.

*) K. J., 16 jara studento, verkis tion originale.

Protektoro: Federacia Prezidanto de Aŭstrio.

Kongresejo: La salonegoj de iama imperiestra kastelo en Wien, Neue Burg.

Leter- kaj telegramadreso: Esperanto, Wien, Hofburg.

Kongreskotizoj:

Favorkotizoj, **validaj ĝis 30. de junio:**

I. Kongresano	sv. fr. 25.50
II. Familianoj de kongresanoj	sv. fr. 16.—
III. gejunuloj malpli ol 18-jaraj	sv. fr. 9.50

Kotizoj post 1. de julio:

I. sv. fr. 28.50, II. sv. fr. 16.—, III. sv. fr. 13.—. Helpkongresanoj, kiuj ricevos ĉiujn dokumentojn, sed ne sendos reprezentanton sv. fr. 12.—.

Senpaga **enirvizo** al Aŭstrio, escepte de senŝtatanoj kaj el USSR.

Vojaĝrabatoj sur fervojoj kaj ŝipoj en Aŭstrio, Belglando, Ĉeĥoslovakio, Francolando, Germanlando, Hungarlando, Italujo, Polujo kaj Rumanujo. Aliaj sekvos.

Rabatoj sur fervojoj:

Polujo: 33% kaj krome nur pago de Zl. 80.—. Petskribojn al Ministerio por Instruado, kiuj nepre jese estos respondataj.

Al la provizora programo:

1. Laborkunsido: Malfermo per parolado de prez. generalo Bastien pri la sanĝo en la organizo de UEA, pentranta la situacion kaj la necesecon de la grava decido, translokigi UEA al Londono.

2. Laborkunsido: S-ro Malmgren, estrarano de UEA, faros enkondukan paroladon pri la metodoj de propagando.

Ni invitas la kongresanojn jam baldaŭ anonci sin ĉe LKK pro parolado al la sama grava temo.

2. aŭ 3. Laborkunsido: Konkurso de opinioj pri certaj E-libroj. Parolad-konkurso pri certa temo, donota dum la kunsido, Detaloj sekvos.

Balfesto: Oni elektos reĝinon de la kongreso. Kunprenu viajn naciajn kostumojn.

Fakaj kunsidoj:

11. de aŭg., 16—18:

Tutmonda Asocio de geinstruistaj esperantistoj, adr. reg. kons. Fritz Stengel, Wien, I., Neue Burg (Int. E-Muzeo), anstataŭ la 14. de aŭg. (La dua okazos la 12. VIII., 16 h).

Komercistoj: Adr. kort. kons. Steiner, Wien, I., Neue Burg.

14. de aŭg., 15.30:

Senalkohola kaj sentabaka kulturo, adr. W. Mudrak, Wien, III., Beatrixgasse 19/9 anstataŭ la 11. de aŭg.).

Katolika Unuiĝo Esperantista

(K. U. E. — Wien). Aranĝoj la 11. de aŭg.: Diservo kun prediko je la 8 h en Minoriten-preĝejo, I., Minoritenplatz.

Festkonveno je la 16 h en Schottenabatejo (Prälatensaal), I., Freyung 6. Informoj: Leop. Chiba, Wien, IV., Schaumburgergasse 5.

Kristana Esperantista Ligo Internacia havos sian fakkunsidon, merkrede, la 12an de aŭg. je la 10 h. Bonvolu atenti la novan adreson de l'aranĝanto: Paul Hübner, Köln-Dellbrück, Gladbacherstraße 1095 I.

5. listo.

547. Pál Márton, Pécs, Hung.
548. Toyoda Juli f-ino, Tokio, Japan.
549. Roubert Anna, instr-ino, Antibes.
550. Cuyon Henri, ŝtatofic., Paris.
551. Francon Louis, instr., Oran, Alĝerio.
552. Guy Georges, instr., Oran.
553. Roubaud Marie, Vence, Franc.
554. Roubaud Paul, farmaciisto, Vence.
555. Roubaud Marie Thérèse, stud., Vence.
556. Guillermos Paulette, Vence.
557. Bonno Ieanne Renée, poŝtofic., Etampes.
558. Bourgeois Charlotte, dir-ino de hospitalo, Creil, Franc.
559. Chedor Germaine, lernejestrino, Le Mans.
560. Grosbois Julienne, instr-ino, Le Mans.
561. Barceló Andreu Juan, militisto, Palma de Mallorca, Hispan.
562. Roome Constance Enid Irma, instr-ino, Sheffield.
563. Beckmann Bjarne, gimnazia prof., prez. de TAGE, Karlskrona, Sved.
564. Ratheram Lilly, telef-ino, Birmingham.
565. Philip Alexander E., ofic., London.
566. Cooper Ellen, Birmingham.
567. Major M s-ino, London.
568. Warner Sarah Mabel, Banbury, Angl.
569. South Amelia, kasistino, Grimsbury Banbray Oxon, Angl.
570. Henriksson Anna Linnéa, Falun, Sved.
571. Henriksson Gustav, ĥemiisto, Falun.
572. Saßmann Alois, lokomotivestro, Linz.
573. Olsson Agda f-ino, Göteborg, Sved.
574. Hansson Hilbert, fervojisto, Malmö.
575. Hansson Clary s-ino, Malmö, Sved.
576. Thibault Andrée Germaine Aimée, urbdoma ofic-ino, Orléans.
577. Widlöf Lisa f-ino, Karlsborg, Sved.
578. Oesterlund Helga Mariana, Eskilskuna.
579. Čišek Jaroslav, tramvojisto, Praha.
580. Kràlik Leopold, Košice, ČSR.
581. Hispana Esperanto-Asocio, Madrid.
582. Hattemer Hermann, komerc., Solothurn.
583. Hattemer Anna, s-ino, Solothurn.
584. Heilker Petro, lernejestro, Hoofddorp, Ned.
585. Vingerhoets Marhilde Eliz. Joanna Christ., instr-ino, Amsterdam.
586. Seitz Vinzenzia, estrino de lernludejo, Haugsdorf.
587. Jankowits Oskar, poŝtofic., Tallinn.
588. Peterson Leonide, ofic-ino, Tallinn.
589. Ehrenberg Marie, ŝtatofic-ino, Tallinn.
590. Dresen Hilda, telegr. ofic-ino, Tallinn.
591. Tomingas Wanda, studentino, Tallinn.
592. Màrkus Frigyes Jànos, Budapest.
593. Terrazzani Lucie, instr-ino, Pirano, Ita.
594. Svitàk Fery, ofic., Praha.
595. Facchi Gaetano, sekr., Brescia.
596. Gallon Emilienne, stenograf-ino, Lyon.
597. Picout Jeanne, instr-ino, Saint-Fons.
598. Garrioud Anne, emerita instr-ino, Lyon.
599. Guyot J., instr-ino, Chaponost, Franc.
600. Parouty F., instr-ino, Lyon.
601. Perra Georgette, instr-ino, Villechenève.
602. Perra Jeannine, instr-ino, Saint-Bel.
603. Carre Juliette, instr-ino, Saint-Etienne les Oullières.
604. Carraz s-ino, lernejestrino, Beynost.
605. Fehr Johanna, lingvo-instr-ino, Wien.
606. Karlsson Hilda, instr-ino, Klippan, Svedl.
607. Hagermann Jonanda, instr-ino, Klippan.
608. Floßmann František, Košice, ČSR.
609. Floßmann Helene s-ino, Košice.
610. Metka Karl, Košice.
611. Metka Franciska s-ino, Košice.
612. Metka Anna f-ino, Košice.
613. Hunter George B., instr., Edinburgh.
614. Beňová Jiřina, instr-ino, M. Ostrava.
615. Benczenleitner Olga, Pecs, Hung.
616. Nydrle Alois, Kladno, ČSR.
617. Kamaryt d-ro Stanislav, prof., prez. de Ĉehoslovaka Asocio Esp., Bratislava.
618. Danilov Leida, ofic-ino, Tapa, Est.
619. Langgard K. Nielsen, instr., Karise.
620. Christensen A., Karise, Danl.
621. Helt A., Vemmetajbe, Danl.
622. Jensen, instr., Terslev, Danl.
623. Jensen f-ino, Fakse, Danl.

Graz: ĉefplaco.

624. Hansen A., f-ino, St. Hedinge, Danl.
625. Larsen A., instr-ino, Fredericia, Danl.
626. van Sijn Petr. Wilh., instr-ino, Haag.
627. Lehnen Dirk. J., instr., Haag.
628. Lehnen Johanna B., instr-ino, Haag.
629. van Veen Rita, Hilversum, Nederl.
630. Klijnstra-Mijnlieff Geetruida Jacoba, Haag.
631. Mulder Hendrika Maria, instr-ino, Badhoevedorp, Nederl.
632. Hammerschmidt Franz, frizisto, Wels.
633. Godehot René, komerc., Dijon.
634. Fonterne Mathilde, Tours.
635. Descamps Roland, ofic., Amiens.
636. Julliart Lucienne, ofic-ino, Amiens.
637. Joussot Paul, ofic., Vincennes.
638. Joussot M. Antoinette, vendistino, Vincennes.

Karavanoj al Vieno:

Société Française pour la Propagation de l'Espéranto, Rosny-sous-Bois, 59, Rue Neuilly (Seine).
Brita Esperantista Asocio, London WC 1, 142, High Holborn.
Reisbureau L. E. E. N., Amsterdam — C, Rokin 57.
Jakob Telling, Rotterdam — C, Schietbaanlaan 106 a.
Pollanda Esperanta-Delegitaro, s-ro L. Kutscher, Kraków, Grodzka 9.
Neŭtrala Centro de Esperanto, s-ro R. Bloch, Praha-Smíchov, 106.
Bulgara Esperantista Asocio, s-ro Ivan Kotov, Ruse, Nacia Banko.
Esperanto-Asocio de Estonio, Tallinn, Postkast 6.
Turizmo S-ga, Kaunas, Lietuvos viešbutis, Litovio.
Svisa Esperanto-Instituto, d-ro Spielmann, Bern, Gesellschaftsstraße 39.
Esperanta Turista Komisiono, Stockholm, Heleneborgsgatan 6.
Jugoslava Esperanto-Ligo, Zagreb, Primorska 11.
Hungarlanda Esperanto-Societo, s-ino Sári S. John, Budapest VI., Hungarl., Vilmos császár ut. 35, I.

Ni rekomendas baldaŭan aliĝon al la kongreso kaj speciale al la ekskursoj de Turisma Servo, por certigi al vi lokojn. Ni ripetas, ke estas vere malfacile ricevi eĉ nun noktigejojn en Salzburg, ĉar en la nuna jaro oni jam antaŭmendis por ŝ 75.000 biletojn por la festludoj (lastjare en la sama tempo nur 17.000). Ni jam prizorgis por preskaŭ 200 personoj litojn en Salzburg, el kiuj 170 estas ĝis nun menditaj. La aliaj devos loĝi en privataj domoj aŭ en lokoj proksime de Salzburg, tien veturigotaj per aŭtobuso. Ĉiuokaze ni jam nun petas, ke vi pripensu la por ni tre malfacilan situacion speciale en Salzburg.

Por Wien vi ne bezonas nepre partopreni en la aranĝoj de Turisma Servo, kvankam partopreno estas ege rekomendinda, ŝparante al vi tempon kaj zorgojn. Sed ni ankaŭ prizorgos noktigejojn de plej malmultekostaj ĝis luksaj, se vi ĝuste ensendos la mendon kaj monon.

Ankaŭ manĝi vi povos pli simple ol ni deziras aranĝi por la Turisma Servo.

Varbu inter neesperantistoj, por ke ankaŭ ili partoprenu nian 28-an kaj per tio fariĝu esperantistoj. Al ĉiuj demandoj aldonu respondkuponon! Mendu niajn belajn glumarkojn: 50 po 1 resp. kup.

„Kongreso de katolikaj Esperantistoj" (XVIIIa), okazos en ĉi tiu jaro en Brno 4.—8. aŭgusto. — Leteradreso: Aleš Berka, Brno, V., Jjrchářích 8. — Kotizo: čK 30.—.

Eldiro de lia ekscelenco **d-ro Antonin Eltschkner,** helpepiskopo en Praha:

„Laŭsperte Esperanto estas la plej taŭga interkomprenigilo kaj sekve povas fariĝi tre utila al la tuta homaro."

23. I. 1936.

Teknika Altlernejo en Wien
R. Nro 1617 el 1935/36

Wien, la 1-an de aprilo 1936

La Federacia Ministerio por Instruado per dekreto n-ro 6495-I/2 de la 27-a de marto 1936 aprobis la nominacion de sinjoro d-ro Sirk kiel lektoro por Esperanto, komence de la somera semestro 1936 ĝis plua tempo.

Esperanto anstataŭ Angla Lingvo en Japana Lernejo.

Ĝis nun en Japanujo la angla lingvo estas rigardata kiel unua fremdlingvo por lernantoj. Sed de la lasta aprilo, kiam nova lernjaro komencis, S-ro Maruyama, lernejestro de la Sesa Knabina Liceo en Tokyo (Tokyo-Huritu Dai-6 Kôtô-Zyogakkô), enkondukis Esperanton kiel regulan lecionon por la unua-jaraj lernantinoj, anstataŭ la angla lingvo, kaj malfermis novan vojon epokfaran por lingvo-instruado en Japanujo.

Car la instruisto estas S-ro Yosi H. Isiguro, meritplena, agema pioniro de nia movado, sukceso de tiu nova Esperanto-klaso estas senduba. Jes, liaj lernantinoj jam montras mirindan progreson, ekz. ludis eĉ teatraĵeton je la okazo de lastjara Zamenhofa tago.

Alsendo de leteroj, kartoj kaj Esperantaĵoj, libroj, gazetoj, afiŝoj ktp. petata. Adreso: S-ro Yosi H. Isiguro, Huritu Dai-6 Kôtô-Zyogakkô, Siba, Tokyo, Japanujo.

De la 31a de aŭgusto ĝis la 7a de septembro 1936 okazos en Ĝenevo **tutmonda junulara kongreso** (adr.: 46, route de Ferney, Geneve), kiu estos organizata de s-ro prof. Wissen. Tiu kongreso akceptis ĝis nun la anglan kaj francan k[a] oficialajn lingvojn; jam oni proponis [l]a akcepton de germana kaj rusa lingvoj. [S]amideanoj! Ni, kaj precipe la junul[o]j inter ni, havas la devon, tuj informi [la] **organizantojn pri nia deziro, ke Esperan[to] estu la oficiala lingvo de la kongreso,** k[aj] ke de nun ĝi estu rekomendata al [ĉ]i partoprenontoj. — Sendu Esp-ajn gazet[ojn] kaj leterojn al la organizanto! Nepre a[ĉ]etu por ke Viaj naciaj junular-organiz[o]j postulu Esperanton en la Ĝeneva Kongres[o].

Por la esperantista delegitaro en la Internacia Konferenco de la Junularo: por la paco **Jürgen Jacobsohn.**

Radio Wien:

Ĉiun merkredon de 18h 30—19h: E.-kurso; je la fino „Informoj pri XXVIII-a".

Vendrede, la 8. de majo s-ano **Ernst Werner** „Kongresvojaĝo tra Aŭstrio, de Wien trans Graz al Klagenfurt" je la 22h 40.

Vendrede, la 22. de majo, 22h 40, s-ano **Alfred Schauhuber** „Rapidbildoj el Aŭstrio" (Salzburg, Linz, Wien, Eisenstadt ,Graz, Klagenfurt, Innsbruck, Bregenz). La enkondukajn vortojn parolos s-ano Hugo Steiner.

Vendrede, la 12. de junio, je 22h 40, kalkulkonsilisto **R. M. Frey** „Kongresvojaĝo tra Aŭstrio, de Klagenfurt trans Großglockner al Zell".

Kiom estas la nombro de la dekdu apostoloj?

Sub tiu titolo faras F. Szilagyi [e]n la jus aperinta „Lingvo-Libro" [i]n spritan raporton pri la enketo de „[d]eĥo", kiuj estas la nomoj de la „12 ap[o]stoloj de la E-movado"? La demand[o] Esp-istaro respondis kaj la rezulto estas [la] nomaro ne de 12, sed precize de 119 [ĉef]-sub- kaj help-apostoloj, kio donas al [ni] nomita verkinto okazon al sekvantaj sati[a] rimarkoj:

Povas esti, ke la afero ne haltos nu[r] eble post la profanigo de la vorto: apost[olo] la Esperantistaro fondos 50 aŭ 100-mem[o]bran „sanktularon", kio certe plifortigos [la] esperantisman spiriton. Imagu, ke la kom[u]na canto-verkisto petos inspiron kun ekĝem[o] „Ho, Sankta Julio Baghy, helpu!" „Ho, Sankta Jean Forge-Fethke, ne forl[a]s min!" Kiel bele sonus: „Ho, sankta L[a]zerovicz!" Aŭ la mondvojaĝantaj pied[i]ro dirus: „En la nomo de Sankta Laksmishwar Sinha mit petas samideanan helpon." (Ĉ[u] oni kuraĝus ne doni?) Aŭ se vi volus [a]l ministerian subtenon, ĉu ne estus efika [la] ekspiro: „Ho, Sankta Hugo Steiner! [Vi] estas hejme ĉie!"

Kaj tiam Ludoviko Lazaro Zamenhof trarigardus ĉe iu steltruo de post la ĉiel[o] kurteno kaj kontente dirus:

„Tro multaj ne estas miaj adeptoj, [sed] ili estas despli gravaj!"

Tamen, provizore mi proponas, ke [ni] elseliĝu de la altaj ĉevaloj kaj humile [ir]u „per pedes Apostolorum".

Japana Esperanto-propagandisto venas [al] Eŭropo.

Samideano Kiyoshi Ikegawa, [ju]na oficisto de l'urba administracio [de] Osaka, iama prezidanto de Tokia E-L[igo] de Universitataj studentoj, alvenos [al] Londono 10. VI., kie li partoprenos [la] 3a Int. Kongreso de Socia Porzorgado (Social Work) kiel delegito de l'urb[o] Osaka. Post la fino de la Londona kon[-]greso, la 18an de junio, li veturos [al] Berlino por Olimpiado kaj poste al Va[ti]kanio, Praha, Vieno por la Univ. Esperanto-kongreso, Budapest, Venezia, Firenco, Roma, Napoli, Brindisi, Patras, Pireo, Candia, Limassol, Cairo, Surz, Singapuro, Hinlando. — Li estas preta fari paroladojn, publikajn pri problemoj de socia porzorgado en Japanujo kaj pri E. Li petas [la] s-anojn en ĉiuj koncernaj urboj helpi dum la vojaĝo. Preferas loĝi en samideana domo, kompreneble kontraŭ pago. Atendas leterojn je adreso: K. Ikegawa, London Esp. Club ĉe The Veterans Club Hall, 47, Bedford Row, W. C. I, London.

…Festsemajnoj en Wien (7.—12. junio 1936) …omesas esti en tiu ĉi sezono speciale gran…zaj: teatraĵoj, muziko, danco, sporto, …pozicioj. Informoj en la vojaĝ-oficejoj kaj: …iener Festausschuß" (Viena Fest-Komitato), …en, VII., Messepalast.

Jakob Ŝapiro (Joŝo).
1911—1936

…ĉefdelegito de UEA en Polujo, festas …9. de majo la jubileon de sia 25-jara …rsista por-esperanta agado. Naskita …97, li jam kiel 14-jara knabo fariĝis …vora Esp-isto kaj ne ĉesis labori por ĝi …hodiaŭ. Unue li fariĝis konata kiel …toro de „Babiladoj de bonhumora Zamen…fano" kaj kiel redaktoro de Esp-a fako …la tre legata germana „Lodzer Zeitung". …ante sekretario de l'urbo Bialystok, li …celis la nomdonon „Zamenhofa" al la …nto, kie naskiĝis la Majstro. — Profesia …nalisto, li havas grandan meriton pro …provizado de l'pollanda gazetaro per …taj por-esperantaj artikoloj. Kiel pre…danto de la Zamenhofa E-societo en …lystok li organizis du internaciajn post…ngresojn kun solena malkovro de Zamen…a memortabulo kaj fundamento de …menhofa monumento (1927 kaj 1931). …Sur esp-a kampo li restas ĝis nun sur …postenoj de Prezidanto de Zamenhofa …societo en B-tok, ĉefdelegito de UEA en …lujo kaj aliaj, daŭrigante la komencitan …tan 25 jaroj fervoran laboron por nia …co.

…Kore gratulas al la jubileanto:
…LKK de 28a, IEMW, AEA, AE.

Honoratus Bonnevie †.

…La Norvega kaj tutmonda Esperantistaro …ploras la morton de longjara persista …ulo de nia afero en Norvegujo; sam. …ind. fil. Honoratus Bonnevie, dum multaj …oj redaktoro de „Norvega Esperantisto", …i poste „E-bladet", prezidanto (1912) kaj …ste sekretario de „Norvega E-Ligo", …rvega ano de Lingva Komitato, elspiris …n animon la 13an de marto.

…Naskita 1858, E-isto de 1906, li ek…miĝis por nia idealo, dum longaj jaroj …gvidis la gvidadon de la norvega …movado en organizaj, lingvaj kaj …neral-sciencaj aferoj, partoprenis 9 univ. …ongresojn kaj staris meze en la por…-a laboro, kiam la morto subite rabis …n el niaj vicoj.

…Honoron al lia memoro!

…La 1-an de aprilo forpasis kviete en aĝo de …jaroj s-ro **Heinrich Jung**, la patro de sam. …o Jung, eldonanto de „Heroldo", post vivo …ena de laboro kaj devokonscio, postlasante …dvinon kaj tri gefilojn.

…Mortis la patrino de nia kara kunlaboranto …j estrarano de „Danubio", sam **Franz Vasta**, …ien.

…Al ambaŭ dolortrafitaj samideanoj kaj al …s tuta familio ni petas akcepti la esprimon …e nia elkora kunsento.

Intern. Esperanto-Muzeo en Wien
I., Neue Burg

La Esperanta horloĝo de prof. M. Arabeno transdonota al la IEMW.

IEMW jus ricevis sekvantan leteron:
Altestimata Sinjoro Direktoro de l' „Inter…acia Esperanto Muzeo", Vieno. — La …familianoj de la estinta profesoro Michele …rabeno de Genova, plenumante la deziron …e l'kara Mortinto, sendas, samtempe kun la nuna letero, al IEMW la horloĝon Esperantan, kiu estis Lia kaj kiun Li juĝis inda aparteni al IEMW.

Restu ĝi en la Muzeo je Lia memoro kaj diru ĝi Lian amon al la lingvo kaj ideo Esperantaj.

La Donacinto naskiĝis en Genova, Italio, la 31an IV. 1872, kaj mortis en Zanica (Bergamo) la 26an de Jan. 1936, pro koratako. Dum 25 jaroj Li fervore partoprenis la Esp-an movadon kaj Li malavare kaj entuziasmoplene helpis al ĝi.

Nun Li ripozas en familia tombo, en la Monumenta Tombejo de Genova.

Laŭ deziro Lia, la ĉi tieaj gesamideanoj ŝur Lia tombo fiksigis verdan stelon kune kun la de Li elpensita jena frazo: „Mi mortis, sed Esperanto vivos!" — Sindonajn salutojn kaj respektoplenajn.

Giovanni Barni, Genova, 29-IV-36.

IEMW transprenis kaj pie konservos la memoraĵon pri la nobla Mortinto inter tiuj de la Majstro kaj aliaj pioniroj de nia movado.

Ĉiu kongresano alportu ion por nia Muzeo!

Dr-o L. L. Zamenhof pri neologismoj.
(D a ŭ r i g o.)

c) La tria kategorio prezentas reformojn, kiuj estas destinataj nur por plaĉi al la nekompetenta publiko aŭ al la neesploremaj poliglotaj kritikistoj kaj fari bonan kaj allogan impreson sur la ne-esperantistojn, sed kiuj prezentas nenian oportunaĵon aŭ prezentas eĉ rekte grandan maloportunaĵon por tiuj, kiuj fervore u z a s Esperanton kaj kiuj bezonas ke Esperanto esprimu aliajn pensojn ne i e l, sed p e r f e k t e. Tiu ĉi kategorio estas por ni la plej danĝera, ĉar por multaj esperantistoj ne sufiĉe spertaj aŭ tro sentemaj por la kritiko ĝi per sia ŝajna scienceco estas tro alloga kaj tro facile tiras ilin al vojoj tre danĝeraj. Al tiuj esperantistoj mi ripetas kaj neniam ĉesos ripetadi la sekvantan tre gravan regulon: m e m o r u ĉ i a m, k e E e s p e r a n t o d e v a s s i n a l k o n f o r m i g i n e a l l a g u s t o j d e ĝ i a j f l a n k a j **rigardantoj,** s e d a l l a o p o r t u n e c o d e ĝ i a j e f e k t i v a j **uzantoj!** Se Esperanto estos bona per si mem, tiam ĝi pli aŭ malpli frue venkos per sia boneco; sed se ĝi elĵetos el si diversajn gravajn punktojn i n t e r n a j n nur por fari allogan impreson e k s t e r a n, ĝi estos simila al sapa veziko, kiu kelkajn minutojn plaĉas al la rigardantoj, sed baldaŭ krevas kaj malaperas. Ekzemple ĉar kelkaj sonoj prezentas (nur en la komenco!) kelkan malgrandan malfacilaĵon por tiu aŭ alia nacio, oni proponas simple elĵeti ilin; ĉar la uzado de la artikolo prezentas en la komenco malfacilaĵon por slavoj, oni proponas simple elĵeti la artikolon; ĉar la uzado de la akuzativo prezentas en la komenco kelkan malfacilaĵon por angloj kaj francoj, oni proponas simple elĵeti ĝin; al la poliglotoj ne plaĉas, ke Esperanto havas kelkan nombron da vortoj arte kreitaj, kiujn ili devus lerni, — oni simple elĵetu ilin kaj anstataŭigu per vortoj prenitaj el iu ekzistanta lingvo. Tre facilaj solvoj! Sur tiuj ĉi facilaj solvoj estas bazitaj kelkaj novaj projektoj, kiuj volis konkuradi kun Esperanto kaj kiuj, tute ne dezirante doni ian praktike elprovitan, vivipovan kaj ĉiubezone uzeblan l i n g v o n, volis nur doni projekton kiu farus bonan i m p r e s o n.



Graz: korto en Landhaus.

Sur tiuj ĉi facilaj solvoj kaj sur tiu ĉi deziro plaĉi al la senspertaj kritikistoj estis ankaŭ bazita — mi sincere tion ĉi konfesas — mia projekto de reformoj en 1894, kiun kelkaj personoj trovas „bonega", sed kiun mi mem trovas nun .... terure abomeninda! Ĉar pli vasta praktika elprovado baldaŭ montris al mi, kia sentaŭga senvivaĵo Esperanto fariĝus, se mi farus la frenezan paŝon kaj — por plaĉi al la eksteraj rigardantoj — mi elĵetus el la lingvo tiujn punktojn, kiuj estas por ĝi interne necesaj. Elĵeto de gravaj sonoj farus la lingvon ne sole neharmonia, sed tre malriĉa kaj ofte tute ne uzebla; elĵeto de la artikolo (kies malfacileco ne estas granda, ĉar nia lingvo ja permesas ne uzi la artikolon) estus tute kontraŭnatura, ĉar ni scias, ke el la lingvoj, kiuj posedis artikolon neniu iam ĝin perdis, sed el la lingvoj, kiuj ne havis artikolon, multaj ilin perforte devis krei al si (ekzemple ĉiuj lingvoj romanaj, la lingvo bulgara k. t. p.); elĵeto de la akuzativo farus la lingvon tute ne uzebla, ĉar nenies kultura lingvo povas ekzisti sen akuzativo (kelkaj lingvoj ne havas akuzativon en siaj substantivoj kaj ilia fleksebleco multe suferas de tio ĉi, kaj tamen eĉ i l i ne povis elĵeti la akuzativon en la pronomoj!); la ellernado de kelka nombro da vortoj arte faritaj por neniu estas malfacila, kaj tamen ili prezentas grandan oportunecon; homogeneco (unufonteco) de ĉiuj vortoj de la lingvo estas ne sole tute superflua (ĉar por la uzantoj de la lingvo estas ja tute egale, ĉu ili diras „blinda" aŭ „ceka", „hundo" aŭ „kano' k. t. p.), sed ĝi estus eĉ rekte danĝera, ĉar ĝi tro multe sklavigus ĉiujn popolojn al la popoloj romanaj, kio pli aŭ malpli frue elvokus tro grandan kaj justan proteston kontraŭ nia lingvo. — Sekve reformoj de la tria kategorio, malgraŭ ilia alloga eksteraĵo, prezentus nur rektan malbonigon de la lingvo, kaj pri ili ni paroli ne bezonas. Daŭrigota.

El Tutmondo.

Internacia S. O. S. Bulteno (Speciala servo de: Radio-Klubo Esperantista de Francujo, 26, avenue Dode-de-la-Brunerie, Paris, 16e), enhavanta detalan liston de Esp-aj radiodissendoj, aperas kiel aldono de la samloke aperanta revuo „Radio-Esperanto". Ĝi adresas al la Esp-aj parolantoj specialan alvokon, por ke ili sendu ĉiam regule, ĝis komence de l'monato, la programon de la elsendoj.

Japanlando: Esperanto kaj Internacia Societo por Virinoj en Japanujo. „Kokusai-Sizyo-Sinzen-Kyokai" (Internacia Societo por Virinoj



Graz: Urba teatro.

k. Infanoj) fondiĝis antaŭ tri jaroj, celante komprenigi Japanujon al eksterlandanoj kaj pliprofundigi internacian amikecon.

En la societo oni starigis E.-fakon en januaro, kaj traktas ĉefe jenajn aferojn.

1. Korespondado kun fraŭlinoj, samideanoj el ĉiuj landoj.

2. Okazigo de E.-kurso, kunveno, ekspozicio ktp.

3. Eldono de gazeto, gvidlibro ktp., por konigi japanan kulturon.

4. Gvido kaj helpo de eksterlandaj vizitantoj k. o.

Ankaŭ en la organo de la societo „Sekai to Zyosei" (Mondo kaj Virinoj) komenciĝis E.-paĝoj.

Bonvolu sendi al ni interesajn artikolojn, pri lerneja vivo, ĉiutaga vivo, moroj kaj kutimoj de knabinoj. Se vi estas malpli ol 30 jara junulino kaj volas korespondi kun japanaj knabinoj kaj junulinoj, sendu vian adreson al: F-ino Yukiko Isobe, 7-5, Ginza-Nisi Kyobasi, Tokyo, Japanujo.

IXa jugoslava Esperanta Kongreso, Ljubljana (30. V.— 2. VI.), jus eldonis grandajn esp-ajn mur-afiŝojn kun programo de la kongreso. Ĉi sendas ilin senpage al ĉiu Esperanta kaj turista centro. Postulu kaj elpendigu en videbla loko!

XVIIIa Kongreso Kataluna de Esperanto, okazonta en Manresa la 31an de majo, 1an kaj 2an de junio 1936 eldonis por varbaj celoj **grandan koloran mur-afiŝon en Esp-o**, kiun la Komitato sendas senpage al ĉiu Esp-a Grupo.

La Lyona Internacia Foiro eldonis bel-aspektan faldprospekton en E., ilustritan, kiel ankaŭ E.-mur-afiŝon. Ambaŭ senpage riceveblaj je peto.

Asocio Esperantista Argentina (Misiones 369 — Buenos Aires) starigis sekcion por informoj kaj propagando, kiu eldonas monatajn cirkulerojn en hispana lingvo por represo en la argentina gazetaro. Inter la notoj tie ni trovis tiujn pri E en la aŭstriaj fervojoj, baldaŭa eldono de aŭstriaj poŝtkartoj kun E-teksto, Univ. E-kongreso k. s., por kies disvastigo en la argentina gazetaro ni esprimas nian koran dankon.

Argentinio: „Ciencia Popular", grava kaj ampleksa revuo argentina, gvidata de s-ro Ignacio M. Gomez en Buenos Aires (str. Chile 1432) publikigis en sia n-ro de decembro tutpaĝan artikolon pri „La insignoj Esperantistaj" kaj reproduktas i. a. la episkopan blazonon de D-ro Anton Eltschkner, helpa episkopo en Praha, kun ĝia esperanta emblemo.

Novaj gvidiloj pri Aŭstrio: Jus aperis, resp. en la proksimaj tagoj aperos sekvantaj gvidiloj: 1) **Supra Aŭstrio: Arto kaj kulturo en Brucknerlando** (Programo por la Aŭstria Bruckner-festo, Linz — St. Florian — Steyr, 18an ĝis 22a de julio), 12-paĝa, belege ilustrita faldprospekto, eldonita de Oberösterreichisches Landesverkehrsamt, Linz. 2) **Gvidilo tra Aŭstrio**, nova reviziita kaj kompletigita eldono; eldonis Oesterreichische Verkehrswerbung (Varboservo de Fed. Ministerio por Komerco kaj Trafiko). 3) Gvidilo tra Wien sub la titolo: **Al Vieno dum ĉiuj sezonoj:** 16-paĝa, riĉe ilustrita, eldonita de Fremdenverkehrsstelle (Fremduloficejo) der Stadt Wien, Messepalast. — Ĉiuj tri nomitaj estas sendataj kontraŭ 1 int. respkupono de Int. Esperanto-Muzeo, Wien, Neue Burg.

Brita Nord-Borneo: „El Verdavalo", nova E.-revuo, eldonata de Verdavalo-eldonejo, Sandakan. Prezo: (afrankite) 2 respondkuponoj. Mendebla ankaŭ ĉe AEA. Ĝis nun aperis tri numeroj kun varioplena, leginda enhavo.

Bulgarujo: „Danuba Federacio" de Coudenhove-Kalergi, kiun ni aperigis kiel ĉefartikolon en la pasinta numero de nia gazeto, aperis en bulgara traduko de sam. Georgi Sapunĝiev la 19an de aprilo en la ĵurnalo **„Varnenska Pošta"**.

Hispanujo. Esperanta fako de „Escuela Natura" (Lernejo Naturo), intencante aranĝi E.-parton en la kursfina ekspozicio de lernantar-laboraĵoj, alvokas ĉiujn E.-grupojn, esperantistojn, gazetojn kaj eldonejojn k. t. p., ke ili sendu al ĝi gazeton, poŝtkarton, folion, broŝuron aŭ kian ajn esperantaĵon: ĝi rekompence sendos al ĉiu, laŭ egalvaloro, seriojn da poresperantaj glumarkoj, kies eldonon prizorgis en Barcelona rondeto „For la Militon!". Adreso: Calle Municipio, 12, Barcelona.

Jugoslavio: Radio Ljubljana la 30-an de majo je la 20.30a horo M. E. T. dissendos E.-akademion, aranĝotan de LKK de la 9. Jugoslava E.-Kongreso, kies malferma kunsido estos parte disaŭgata la 31-an de majo, je la 10-a M. E. T.

Nederlando. Granda sukceso ĉe Interna... Pedagogia Konferenco en Utrecht. E... Internacia Pedagogia Konferenco, kiu o... 14.—20. IV. en Utrecht (Nederlando) ... atingis por E natenditajn sukcesojn. A... pli ol 700 instruistoj estis faritaj paro... pri E; partoprenis je ili s-ino Isbrücker, ... Cseh kaj Glück. Ankaŭ la prezidanto d... Konferenco, s-o Kees Boecke, parolis tre ... por la enkonduko de E. en la lernejojn ... rekomendis la uzadon de E. por interna... kongresoj. La kongresanaro montris gran... veran intereson. J. G...

Nederlando: Internacia E.-Kurso po... geoficistaro de poŝto, telegrafo kaj tele... okazos en la E.-Domo en Arnhem 6—16 ... 1936. Kursgvidanto Andreo Cseh.

Polujo: Aŭstria Vespero okaze d... XXVIII Univ. Kongreso de E. en Wien ... aranĝata de la **Societo Turisma de E.-isto... Polujo** la 24-an de aprilo en Warszawa. ... okazis sub la alta protektorato de Lia E... lenco S-ro Maximilan Ritter von Hofin... ambasadoro de Aŭstrio. Riĉa programo va... por Aŭstrio kaj la 28-a. Pri tiu vespero ra... de la oficiala informoficejo estis donata sa... la 25-an de aprilo, en Radio Wien.

Svedujo: La Klubo Esperantista de Ma... festis sian 30-jaran jubileon la 13-an de ap... Interesa kaj riĉenhava programo.

„Berno, la pordo al la Alpa montaro", ... eldonita 12-paĝa faldprospekto de la s... ĉefurbo. Multaj ilustraĵoj, detala listo ... priskribo de la urbo kaj ĝia regiono faras ... artisme presitan gvidilon nepre havinda ... ĉiu interesato. Senpage ĉe: **Oficiala Kontoro ... Trafiko, Bern, Bundesgasse 18** (Svislando).

La olimpia tradicio de Aŭstrujo.

De Dr. Theodor Schmidt

prezidanto de la Aŭstruja Olimpia Komitato kaj membro de Internacia Olimpia Komitato.

La nacio, kiu inter la nacioj de la Olimpiaj Ludoj estas la plej riĉa je tradicio, estas ankaŭ la plej juna: USA. Jam la unuan provon, Olympia-n regajni por nia epoko, la USA.-anoj ĉeestis kaj prenis la ĉefajn sukcesojn. Ankaŭ en Paris, St. Louis, London, Stockholm, Antwerpen, ree en Paris, poste en Amsterdam kaj laste en Los Angeles la nordamerikanoj staris en la unuaj vicoj. Lukton kun ili povis riski nur tiuj popoloj, kies sporto pro la amasoj, kiujn ĝi ekmovas, kaj pro la abundo de talentoj, kiujn ĝi posedas, mem havas olimpian tradicion.

La sportmovado en Aŭstrujo ja estas relative juna. Sporto—ĝi signifis al multaj en ne jam tre longe pasinta tempo riskadon de sanaj membroj aŭ minimume ties endanĝerigon—sed sporto signifis ankaŭ la montradon de fortikula, senkultura vivkompreno! Jen je la fino de la lastpasinta jarcento Pierre de Coubertin efektivigis la olimpian ideon kaj baldaŭ poste komenciĝis la senkompara venkiro de la sporto tra la tuta mondo. La olimpiismo kun siaj altaj celoj trovis ankaŭ ĉe ni en Aŭstrujo rapide—komence ja malgrandan — nombron da entuziasmaj anoj, kiuj fariĝis jam armeo.

La Internacia Olimpia Komitato estas reprezentata en Aŭstrujo jam de 30 jaroj; de 1905—1909 de la princido Aleksandro Solms-Braunfels, de 1911—1919 de la princo Otto Windischgrätz, la bonepo de imperiestro Francisko Josefo I., kaj—ĉar Aŭstrujo tiam rajtis postuli por IOC du membrojn — de 1912—1919 ankaŭ de grafo Rudolf Colloredo-Mannsfeld. Princo Windischgrätz ludis en IOC gravan rolon; 1914 li prezidis la kongreson en Paris kaj estis eĉ intencata kiel prezidanto de IOC. (IOK.)

Grafo Colloredo gvidis la Olimpian lud... aron de Aŭstrujo 1912 en Stockholm. ... la milito IOC sendis nur jam unu dele... en Aŭstrujon. Tiu estis ĝis 1928 la fa... konata Rentgenologo prof. Dr. Mar... Haudek kaj de tiam Dr. Theod... Schmidt.

Jam en la unuaj Olimpiaj Ludoj en At... ankaŭ Aŭstrujo partoprenis kaj ven... Adolf Schmal-Filius, pioniro de ... sportmovado, atingis la unuan rangon en ... dekdu-horojn-biciklado; en la naĝkonku... sur 1500 m venkis Dr. Paul Neuman... Dr. Otto Herschmann venkis d... naĝinte 100 m en libera stilo. En la at... disciplino (levado) akiris la pezulo Jos... Steinbach la duan rangon.

1900 en Paris akiris la aŭstro Ka... Buberl du duajn premiojn por naĝ... nome en la konkursoj pri naĝadoj surdo... kaj liberstila, ambaŭ sur 200 m.

En la t. n. „interolimpiado" en At... (1906) fariĝis Dr. Otto Scheff olimpi... iko en la liberstila naĝado sur 400 m ... tria sur 1500 m: Josef Steinba... fariĝis unua en la pezklasa levado. 19... (London) ree partoprenis Dr. Scheff ... ĝisnaĝis liberstile la trian lokon. 1912 (Sto... holm) fariĝis nia nuntempa trejnisto kolon... Verderber dua en la sabroskermado ... komencis la vicon de l' olimpiaj sukce... de niaj elprovitaj skermantoj.

Ankaŭ en la Olimpiaj Ludoj post la mon... milito. Aŭstrujo bonege rezisis, kvanka... la aliaj nacioj estis kolose progresintaj ... ĉe ni la preparado renkontis plej granda... malhelpojn. Belajn venkojn havigis al ni ... aro 1924: la aŭstrino Herma Pla... Szabo venkis en la 1. Olimpiaj Vintrolud... en Chamonix en la prilerta glitkurado ...

gelmann-Burger atingis la unuan
on de la par-kurado.
Ankoraŭ pli sukcesa olimpiojaro estis
28. En St. Moritz fariĝis inĝ. Böckl dua
st Grafström en la prilerta glitkurado de
oj kaj Karl Schäfer la pliposta grand-
istro de la glacisporto, fariĝis la kvara.
paroj Scholz-Kaiser kaj Brunner-
rede fariĝis duaj kaj triaj en la par-kur-
. En la sama jaro venkis en la 9. O. L.
msterdam) Andrysek en la plumpeza
so de levantoj, dum en la malpeza klaso
as kun la germano Helbig kune akiris
unuan lokon. Tiam Aŭstrujo disponigis
aŭ trian venkinton: la konata Wien-a
tkisto Grienauer akiris la olimpian
non en la medalarto. La remantoj Feßl
Loserth de la Linz-a remunuiĝo
cking" povis akiri la trian lokon en la
kurso de la duoblduuloj; en la dekonaro
nkursgrupo, konsistanta el dek diversaj
roj, ludendaj de ĉiuj konkursanoj) la
grava kaj plej ampleksa inter ĉiuj olim-
disciplinoj, povis Ludwig Wessely
traŭ la mondkonkurenco atingi honor-
an sepan lokon.
La O. L. 1932, kiuj okazis en USA, estis
Aŭstrujo malfacila problemo. Preskaŭ
subteno, la AIK tamen sukcesis
ponigi la sumojn por sendo de ŝancori-
konkursanaroj. En la 3. Olimpiaj Vin-
ludoj en Lake Placide (New York)
strujo estis la plej sukcesa nacio. Karl
häfer detronigis sian grandan kon-
anton, la svedon Grafström, kaj
itzi Burger fariĝis la dua post
ja Hennie. Ĉi tiuj du sukcesoj signifis
legon por Aŭstrujo, la interesiĝo pri
lando grave pligrandiĝis per tiuj
kompareblaj faroj de niaj glaciartistoj.
Ankaŭ en la 10. O. L. en Los Angeles
strujo kolektis—konsidere al ĝiaj malmul-
reprezentantoj—tre bonajn, eĉ bonegajn
zultatojn. Pri la floredskermado ekzistis eksterordinara favoratino: la germanino Helen Mayer, la venkintino en Amsterdam. Oni atendis, ke ŝi la titolon simple reprenos, sed ne, ke ŝi devos batali por ĝi. Sed okazis io alia. La gracila Wien-anino Ellen Preis surprizis per siaj supera povo kaj brila stilo kaj akiris la oran medalon por Aŭstrujo. En la fortsporto konkeris Haas (en la malpeza klaso) post la franco Duverge la duan lokon: Karl Hipfinger fariĝis la tria en la meza klaso kaj la luktanto Hirschl elbatalis du bronzomedalojn, sc. en la greke-roma kaj en la libera stiloj. Rinner klasigis sin en la 400 m-kurado por la antaŭlasta elektiĝo kaj kiel la plej kapabla eŭropano, ĉar Ameriko kaj Aŭstralio batalis solaj pri la finvenko. En la artsaltado de virinoj Mädy Epply fariĝis sesa, en la saltado de sur turo, sepa, kaj Sepp Staŭdinger prenis la naŭan lokon de l'artsaltado de viroj.

Ĉi tiu faktaro montras, kiom Aŭstrujo ĝis nun kontribuis al la O. L. Tial ni faros nian eblon, por rehonorigi la olimpian tradicion de Aŭstrujo en la 11. Olimpiaj Ludoj.

Dr. Adolf Halbedl, Ried i. I.

Maria Zell, fama pilgrimloko.

Porhejmaj Taskoj.

Kontraŭfakturo.

De Alice Falk, Wien.

La malgranda Peĉjo aŭdis iutage, ke lia patro parolis pri pagotaj fakturoj. Li decidis ankaŭ kompili fakturon por ĉio, kion li faris ĉiutage kaj tiun ĉi fakturon li volis transdoni al sia patrino. Iun matenon la patrino trovis apud la telero papereton, sur kiu estis skribite: Panjo ŝuldas al Peĉjo:

por alportado de diversaj alumetujoj	20 g
por portado de la leteroj al poŝtoficejo	10 g
por alportado de poŝtmarkoj	20 g
ĉar li ĉiam estis bona knabo	15 g
ensume	65 g

La patrino nenion diris, sed vespere Peĉjo trovis ĉe sia telero la postulitan monsumon. Kontente li enpoŝigis ĝin, sed li vidis ankaŭ karteton kun jena kalkulo:

Peĉjo ŝuldas al la patrino:

por la dek jaroj, kiujn li pasigis en ŝia domo	nenion
por la manĝado dum dek jaroj	nenion
por lavado kaj flikado de vestaĵoj kaj tolaĵoj	nenion
por flegado dum malsanoj	nenion
por ĉiuj aliaj penadoj	nenion
kaj ke li ĉiam havis bonan patrinon	nenion
ensume	nenion

Peĉjo legis ĉi tiun fakturon kaj silentis. Post iom da tempo li ŝteliris al la patrino kaj kun forte batanta koro li metis singarde la ricevitan monon en la poŝon de sia antaŭtuko.

Al la alvoko por donaco vidvino Kreuz:

1. listo	S 20.38
Tolnai Paŭlo, Budapest	S 10.—
entute	S 30.38

Universala Esperanto-Asocio
Ĉefdelegiteco por Aŭstrio
Wien, I., Neue Burg.

La **ĝenerala kunsido** de UEA okazos dum 28. Univ. Kong. en Wien, merkrede, la 12. de aŭg., je la 10 h. — Proponoj estas petataj.

Komerc—Aŭstria.

Ni instalas **Centran agentejon por vendado de aŭstriaj varoj** en la kadro de la komerca agentejo de nia d-ro Höfer. Temas pri jenaj varoj, produktataj en Aŭstrio, kiuj ĉiam estis kaj estos **famaj** en tutmondo **pro la tipa aŭstria eleganteco** kaj la speciale **altnivela kvalito.**

Jam en la nuna komenca stato jenaj unuarangaj firmoj disponigas siajn **produktajojn al vi je prezoj konkurencaj.**

En nia laboro ni kalkulas kun la samideanoj en la diversaj landoj, kiuj aŭ estas komercistoj mem aŭ deziras peri negocojn, enspezante per sia helpo procentaĵon.

Skribu sub **„Komerc-Aŭstria", Wien, I., Neue Burg,** kaj vi ricevos tuj detalajn ofertojn kun prezoj kaj la alto de la maklerajo.

Interesuloj speciale estas invitataj partopreni en 28-a Univ. Kongreso de Esperanto en Wien (8.—15. aŭg. 1936), dum kiu ni aranĝos **Fakkunsidon de komercistoj.**

Kort. kons. Hugo Steiner, Dr. Max Höfer.

Ehrbar-fortepiano mondfama — nobla sono — solida Wien, I., Parkring 18 Tel. R-23-2-34	**Robert Knisch** Fabrikado de muzikiloj Wien I., Himmelpfortgasse 20	**Carl Ceschka & Söhne** ĉapelfabriko La ĉapelo „Esperanto" Wien VII., Kaiserstraße 123	**Löwy & Co.** Fabrikado de vestaĵbukoj kaj butonoj el artkorno Wien XVI., Römergasse 35
Model-vendejo Adele Groß Vienaj manfaritaj trikaĵ-modeloj por sinjorinoj, sinjoroj kaj infanoj Wien, VI., Barnabitengasse 9	**Hermann Spielmann & Sohn** Fabriko de silkaĵoj „Sphinx"-kravato el unu peco de pura silko (ankaŭ kun la verda stelo) Wien, I., Graben 12	**Edelmetallwerke A.-G.** antaŭe Wilhelm Tobias Wien, Aŭstrio, 13., Kuefsteing. 17—19 Fondita 1870 Specialaĵo: Fabrikado de laŭmoda ornamaĵo ĉiuspeca laŭ Viena artmetia stilo el latuno, alpako nikelumita, kromumita, arĝentumita kaj orumita.	**I. Blocksberg** Wien, VII., Neubaugasse 36 Fabrikado de oraĵoj kaj de unuarangaj belegaj pudrujoj kaj cigaredujoj el metalo.

Aŭstria Esperanto-Asocio
Wien, I., Neue Burg (Tel. R-27-803).

je memoro al Robert Kreuz por lia vidvino:

El la dua listo	S 124.50
erare „Kolekto Zeller“ S 19.—	
anstataŭ 16.—	S 3.—
do ĝuste . .	S 121.50
E.-Soc. Fideleco Wien	S 10.—
Dir. Josef Schamanek, Tullnerbach	S 5.—
Vinzenzia Seitz, Haugsdorf . .	S 3.—
Maria Krausz, Wien	S 1.—
E.-grupo, Krems a. d. D. . . .	S 5.—
entute . .	S 145.50

Organiza deklaro.

Aŭstria Esperanto-Asocio kiel la **oficiala landa Esperanto-organizo** por Aŭstrio deklaras, ke ĝi havas nenion komunan kun la nove fondita „Aŭstria Esperanto-Federacio“, sidejo, Wien, XV., Holochergasse 55.

La nova fondaĵo rifuzis aliĝi al la sola centro de l'internacia neŭtrala Esperanto-movado, Universala Esperanto-Asocio, deklarante ĝin ne-neŭtrala; ĝi rifuzis plue, en la kadroj de nia landa organizo kunlabori por Esperanto kaj por nia Kongreso, preferante ekster ĝiaj kadroj, tute sendepende, disvolvadi sian de neniu supera Esperanto-instanco kontrolatan agadon.

Pro tiuj kaŭzoj Aŭstria Esperanto-Asocio deklaras, ke ĝi povas transpreni nenian respondecon por la agado de „Aŭstria Esperanto-Federacio“ kiel federacio kaj de ĝiaj apartaj grupoj.

*

Ni ne deziras polemikon kun Aŭstria Esperanto-Federacio. Same nia unua cirkulero „Al la neŭtrala esperantistaro de Aŭstrio“ (represita en la lasta „Aŭstria Esperantisto“) kiel ĉisupra deklaro estas diktitaj **sole el la vidpunkto de organiza unueco.**

Aŭstria Esperanto-Asocio.

Informoj:

Nian alvokon ariĝi en AEA, ĝojige multaj konsciaj esp.-istoj sekvis. Ili komprenis la necesecon de membreco al **la Landa Organizo.**

Ni preparas fondon de **Viena E.-Delegitaro**, kiu ekfunkcios baldaŭ. Ĝi celu interkonsente kun la instruista sekcio de AEA aranĝi multajn kursojn en aŭtuno kaj kiel suborganizo de AEA aranĝi la propagandon en Wien.

Ĝenerala kunveno.

La ĝenerala kunveno de Aŭstria Esperanto-Asocio okazos vendredon, la 14an de Aŭgusto 1936, je la 15h 30. Loko ankoraŭ sciigota. Ĉiuj membroj de AEA estas invititaj, partopreni la ĝeneralan kunvenon kaj kundecidi la pluan gvidadon de la Aŭstria Esperantoorganizo.

Provizora tagordo:

1. Raportoj de la funkciuloj pri la asocia agado kaj raporto pri la kasrevizio,
2. Novelekto de la estraro,
3. Demandoj de la Aŭstria kaj internacia Esperanto-movadoj,
4. Eventualaĵoj.

Ĉiaj proponoj, precipe koncerne la novan estraron, estu senditaj ĝis fino de Junio al nia adreso.

Gustatempa ordigo de la administraj aferoj.

Pro la kongrespreparo ni petas, ke ĝis la sama dato (fino de Junio) la E.-grupoj, se ili ne jam faris tion, sciigu al ni la plenan liston de siaj membroj kun ties adresoj kaj profesioj kaj speciale la nomojn de la estraranoj por la nuna jaro.

Ankaŭ la kotizoj por 1936 estu pagitaj ĝis la fino de Junio, por ke al la ĝenerala kunveno ni povu prezenti kompletan raporton pri la administracio en 1936.

Monataj informiloj.

Depost Marto 1936 AEA eldonas je la 20a de ĉiu monato germanlingvan informilon senkoste por ĉiuj membroj; parte ili estas — por informo — senditaj ankaŭ al aliaj aŭstriaj esperantistoj.

Landaj reprezentantoj de AEA.

Laŭ iniciato de la E.-klubo Innsbruck ni publikigis en n-ro 4 la instigon, nomi en ĉiu liglando unu oficialan reprezentanton de AEA.

Kiel unua estas nomita por Tirolo d-ro **A. Karner**, Innsbruck, Höttingerau 44, kiu direktas en taŭga maniero la propagandon en sia lando. Nuntempe okazas Ĉe-kursoj en Innsbruck, Hall, Wattens, Schwaz, Wörgl, Kufstein kaj Telfs. Diversaj lokaj ĵurnaloj aperigis bonajn artikoletojn pri la E.-movado en Tirolo. Precipe atentinda estas la komuniko en „Innsbrucker Volkszeitung“, ke la landa sekcio de AEA en Innsbruck sendas al ĉiu interesiĝanto senkoste la novan E.-ŝlosilon.

Ni esprimas al niaj Tirolaj samideanoj sinceran gratulon pro ilia sukcesa laborado kaj deziras similajn sukcesojn ankaŭ al la aliaj liglandoj.

Por Karintio, laŭ propono de la loka grupo Klagenfurt, estas ĵus nomita s-ano **Paul Komposch**, Klagenfurt, St.-Veiter-Ring 5, kiel oficiala reprezentanto de AEA. Aliaj sekvos.

Instruista sekcio de AEA.

Pro la grandnombra partopreno de instruistoj en la 28a Universala Esperantokongreso kaj la espereblaj rezultoj de iliaj fakaj kunsidoj ni alvokas ĉiujn E.-instruistojn sciigi al ni siajn nomojn kaj adresojn, por formiĝo de instruista sekcio, laŭ jenaj grupoj:

1e) profesiaj instruistoj sciantaj Esperanton, ĉu kun, ĉu sen E.-ekzameno;
2e) neprofesiaj aŭ kromprofesiaj instruantoj de E., kun E.-Ekzameno pri instrukapableco;
3e) neprofesiaj instruantoj de E. sen ekzameno, sed kun spertoj pri kursoj.

Bonvolu anonci, por kiaj kursoj vi pensas esti speciale taŭga kaj preta. La nomojn kaj adresojn ni petas tre baldaŭ sciigi al la adreso de reg. kons. **Fritz Stengel**, estrarano de AEA, Wien, I., Neue Burg (Int. Esp.-Muzeo).

Estraro de AEA.

Salzburg. Printempa festo okaze de 15-jara jubileo de la Esperanto-grupo. Programo: 9. majo 20h 30 festvespero en gastejo Schwarzes Rössel, Bergstraße 5, kun teatraĵeto ktp.; la 10. majo promenado tra la urbo, renkonto en vinkelo St. Peter k. a. — Gastoj bonvenaj.

Esperanto-Societo „Danubio“, Wien. Programo de la kunvenoj lunde je la 8-a horo vespere en la hejmo, VIII., Alserstraße 63 A:

4. V.: **Dro A. Mildwurf:** Miaj vojaĝimpresoj sur Feroaj Insuloj, Islando kaj Grenlando.
Dro E. Pfeffer: Lingvaj problemoj: Deveno kaj analizo de la elementoj de l'E.-vort-formado.
11. V.: **Dro Alfred Engländer:** Juraj problemoj de la ĉiu-taga vivo.
18. V.: **Dro Hans Ullrich**, stud- kaj esplorvojaĝo sur la veljaĥto „Universitas“ al Greklando (kun lumbildoj).
25. V.: **Dir. Hans Struska:** Libertempo en nia bela Salzkammergut (kun lumbildoj).

Antaŭe de la 7.30h: Konversacia leciono.

Esperanto-Klub, Wien. Unua ekskurso ĉe malvarma vetero, alveno per tramo en Strebersdorf, de tie piede al Korneuburg kaj de tie batalante kontraŭ malagrabla vento al kastelo Kreuzenstein. Post la rigardo de la ege interesa kastelo kaj rondirado en ĝi ni bonhumore kaj gaje en la kastelfoso manĝis la kunprenitajn manĝaĵojn sub libera ĉielo. Poste kantante ni iris malsupren la monteton en gastejon, kie ni sidis ĉe bona kafo ankoraŭ 2 horojn kaj poste iris hejmen. Dum la returnirado la ekskursanoj eniris la belegan ĝardenon de [...] estro. Elfriede Hojtasch, sekr.

Esperanto-Klubo, Wien, ekskursos la 17. majo. Ni veturu per Südbahn al Mödling la 8h 50, ariĝos ĝis la 10h sur la ĉefplaco. [...] tie promenado al Anninger supren, kie manĝos la kunprenitajn manĝaĵojn. Post[...] meze ni iros al Gumpoldskirchen kaj de [...] reveturos per trajno al Wien. Kombina bil[...] tramo en Wien, veturo al Mödling, revet[...] de Gumpoldskirchen ĝis Wien kaj per tra[...] hejmen ŝ 1.70, aĉetebla ĉe la konduktoro en tramo.

Esperanto-Klubo, Wien. En la vico [...] gvidadoj tra Wien la unua okazos la 31. majo. Renkontejo precize je la 8h antaŭ Mich[...]lertor de Hofburg. Daŭro 2 horojn.

Esperanto-Klub-anoj atentu!

Ĵus aliĝis nia **80. membro** s-ano Rud. Ulbri[...]

La 12. de majo ni la unuan fojon kunv[...] en „Wiener Molkerei“ en Prater, Hauptal[...] je 18h 30. Dum la somero ni ĉiam renkont[...] tie! Venu multnombre kiel kutime kaj ven[...] amikojn!

Katolika Unuiĝo Esperantista (K. U. E.) Wi[...]

La ĝenerala kunveno okazis la 22an de ma[...] Ĉeestis komandora Moŝto P. Plank, pa[...] Hasenhütl O. F. M., la kort. kons. dro. W[...] dro. Heeber, prez. Steiner kaj multaj geanoj [...] geamikoj de nia rondo.

Post sta. beno, celebrita de parohe[...] P. Plank, prez. Hovorka malfermis la „[...] kunvenon“, salutis la ĉeestantojn kaj pa[...] rimarkinde pri la evoluo de nia kris[...] Aŭstrio kaj tiam li transdonis la prezid[...] hon. prez. Leop. Chiba, kiu plue prizorgis [...] daŭrigon de la tagordo. —

La agadraporto de la pas. unuiĝa [...] montras multspecan pomalgrandan laboron [...] pliprofundiĝon en la unuiĝa vivo. Fine de [...] detala raporto, la prez. dankas al ĉiuj, ki[...]ajn kunhelpis kaj subtenis la katol[...] E.-movadon. Pri bona ordo en la [...] raportis la kasisto dir. Schiebl. — [...] membrokotizo estis fiksita je ŝ 3.— p[...] Novelekto: prez. Leopold Chiba, vicprez. Z[...]mermann kaj Bar. Sidi Scherpon, sekre[...] Walter Mudrak, kasisto dir. Hans Sch[...] Parolis pri la Universala Kongreso en W[...] kort. kons. Steiner ,pri la Katolika Kongres[...] Brno (4.—8. VIII.) Chiba. Nun sekvis [...] kantoj de Rosa Wernert; kaj tre inte[...] lumbildparolado pri „Palestino“ de [...] Tomasek finis la belan vesperon.

Provu japanan varon malkaran.

Japana teo, bonodora kaj bongusta 7. resp. [...]
Rava pupo, japana altklasa belartaĵo 5 res[...]
Bela florvazo kun virina figuro 4 resp. k. [...]
Ĉe T. Yosioka, Okada-kata, Torrityo, W[...] kaiti, Jap.

Solvo de Aritmogrifo el n-ro 4: La dudek[...] Universala Kongreso de Esperanto en Vi[...]

Literŝanĝenigmoj.

1. Paris	2. Mars	3. Rus[...]
— — — — — —	— — — — — —	— — — —
— — — — — —	— — — — — —	— — — —
— — — — — —	— — — — — —	— — — —
— — — — — —	Hoko	Meĉo
Konto		

Ĉiu litero estu nur unufoje ŝanĝota.

Germana ŝlosilo: Eldonejo Albrecht Dü[...] Wien, VII., Bandgasse 28, aŭ en iu librov[...]dejo aŭ ĉe AEA, kiu tuj aranĝos la alsend[...]

„Sphinx“-kravato kun la verda stelo[...]

La kliŝoj de Oesterr. Verkehrswerbung.

Eigentümer, Herausgeber und verantwortlic[...] Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bund[...]straße154. Druck: Buch-, Kunst-und Zeitungsdruck[...] „Albrecht Dürer“, Wien, VII., Bandgasse 2[...]